# *Tutlanda kampanjo kontra? poliomjelito.*



La 54-a tutlanda kampanjo de vakcinado kontra? poliomjelito-malsano ekos ekde ?i-lunde ?is la 15-a, kaj per ?i estos imunizataj preska? duonmiliono da kubaj infanoj, informis la doktoro Miguel Angel Galindo, funkciulo de la kuba ministerio pri publika sano.

Galindo, asesoranto de la nacia programo de imunizado de la koncerna ministerio, klarigis al la informagentejo AIN, ke en tiu dato ricevos la dozon la infanoj kies a?o estas inter 30 tagoj ?is 2 jaroj, 11 monatoj kaj 29 tagoj.

En la dua etapo de la kampanjo,  de la 27-a de aprilo ?is la 3-a de majo, tiuj infanoj ricevos la duan dozon, kaj krome, oni reaktivigos per dua dozo la infanojn  de 9 jaroj ?is 11 monatoj kaj 29 tagoj, tio estas, aliaj 111 323 infanoj.

La funkciulo memorigis ke ekde 1962, kiam Kubo eliminis tiun malsanon de poliomjelito, kaj ?is la jaro 2014, oni aplikis en la lando proksimume 83 milionojn  da dozoj de tiu prepara?o, kio garantiadis protekton al la kuba lo?antaro malpli ol 68 a?a.

La spertulo konfirmis ke la kampanjon partoprenos ?iuj kuracistoj, flegistinoj, respondeculoj pri sano de la najbaraj komitatoj por defendo, la federacio de virinoj kaj teknika personaro, interalie.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/48773-tutlanda-kampanjo-kontrau-poliomjelito

**Radio Habana Cuba**